Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe Facebook kaj Instagram.

# tejo:aktuale

n°490 | Decembro 2023

**Karaj abonantoj, bonvenon! Kiel kutime, jen via monata raporto pri projektoj, eventoj, kaj iniciatoj de junaj esperantistoj el ĉiuj kontinentoj.** En ĉi tiu eldono, ni kompreneble fokusiĝas pri tio, kio okazis ĉi-monate, sed estante la lasta de 2023, ni ankaŭ profitas la okazon por retrorigardi la tutan jaron kaj esprimi nian dankemon pro la ĉiama subteno. Ni denove festas jaron plena je projektoj, renkontiĝoj, (retaj) eventoj, muzikaloj, aventuroj, novaj iniciatoj, revuoj... kaj pli! Ni festu kaj antaŭĝoju por la venonta jaro: ĝi estu eĉ pli sukcesa! **Feliĉan kaj prosperan sezonon al ĉiuj!**




Okaze de la **Zamenhofa Tago 2023** (15-a de Decembro), ni demandis al esperantistoj el la tuta mondo sendi bondezirojn aŭ rakonti pri siaj spertoj rilate al lingva identeco. Spektu la filmeton kaj festu kun ili!




**Ĉu vi interesiĝas pri junulara edukado kaj homaj rajtoj?** Ni serĉas du faciligantojn por helpi gvidi la seminarion "*Kreante pontojn per Interkomprenigo: Homaj Rajtoj kaj Migrado en la ĉi-jarcenta Eŭropo*" organizita kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo. Legu detalojn en nia retejo kaj kandidatiĝu!




La Komisiono de TEJO pri Edukado (kiu pritraktas ĉiujn edukajn iniciatojn en TEJO aŭ la junulara movado) ŝatus kolekti informojn kaj registri klubojn gvidatajn de junaj esperantistaj instruistoj ie ajn en la mondo. **Ĉu estas vi?** **Plenigu la demandaron!**



**Ĉu vi jam konatiĝis kun la volontuloj de la volontula periodo 2023-2024?** Jen via ŝanco: legu la prezentojn de Maria, Salvatore kaj Cyril, niaj ĉiutagaj helpantoj en la Centra Oficejo!




***Kontakto* 314 (2023:3) haveblas!** En ĝi, vi trovos interesegajn artikolojn pri aktualaĵoj de la mondo, nia kara movado, arto, scienco... kaj pli! Elŝutu la PDF-dosieron!




**Restas nur kelkaj tagoj por sendi vian kandidatiĝon** kaj organizi kune kun TEJO la 81-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en via lando en 2025! Ĉu vi estos parto de la historio de la plej mojosa evento de la jaro?




**Ĉu vi ĉiam volis volontuli por kaj per Esperanto?** La tuluza Esperanto-Kultur-Centro (Francio) serĉas junulojn (18 ĝis 25-jaraĝaj), loĝantaj en landoj de Eŭropunio por volontuli kaj promocii internaciajn rilatojn per Esperanto, en Tuluzo kaj ĉe esperanta partnerasocio en Eŭropo (Pollando, Slovakio aŭ Italio). Eksciu pli kaj kandidatiĝu antaŭ la 7-a de Januaro!

# IJK 2024




La <u>Internacia Junulara Kongreso 2024</u> **okazos en Šventoji (Litovio) inter la 18-a kaj 25-a de Aŭgusto 2024.** Jam aperis multaj informoj pri la kongreso: vizitu la retejon por ekscii pli pri Litovio, la kongresejo aŭ eĉ la organiza teamo!




**Ĉu vi deziras kunlabori por krei memorindan sperton por la junularo tutmonde?** La organiza teamo de IJK 2024 en Litovio ĉiam serĉas novajn kunlaborantojn por helpi organizi tiun nekredeblan kongreson por ĉiuj partoprenantoj. <u>Aliĝu tuj kaj antaŭĝoju!</u>




**Ĉu vi volas senpage partopreni IJK-n, dum vi ridigas Esperantujon?** Pretigu komedion kaj ludu ĝin: tiel, vi havos la oportunon veni al IJK, kie vi ricevos la laŭdojn kaj aplaŭdojn de la Esperantistaro. Kontrolu la <u>regulojn</u> de la konkurso kaj pretigu vian komedion!

# Venontaj eventoj

---




KEJ anoncis sian venontan junularan vintran aranĝon, la **RenKEJtiĝo**! Ĝi okazos **inter la 23-a kaj la 25-a de Februaro 2024**, en **L'Espluga de Francolí** (suda Katalunio). Amika etoso kaj memorindaj spertoj certe atendas vin tie: <u>aliĝu</u>!




Ĉu vi pretas por duobla poliglotumado? La Plurlingvula Kunveno (*Polyglot Gathering*) denove okazos en 2024. La reta evento okazos de la **29-a de Februaro ĝis 3-a de Marto**, kaj la ĉeesta parto okazos en **Prago (Ĉeĥio) de la 15-a ĝis 19-a de Majo**. <u>Vizitu la retejon por ricevi pli da informoj kaj aliĝi.</u>




IEJ atendas vian partoprenon en la **47-a Internacia Junulara Festivalo** en **Serrada di Folgaria (Italio)** de la **27-a de Marto ĝis la 2-a de Aprilo**! <u>Aliĝu plenigante la formularon.</u>





**Strasburgo (Francio)** bonvenigas vin por interasocia **Eŭropa Esperanto-Kongreso** de la **8-a ĝis la 12-a de Majo 2024**. Bunta kultura kaj kleriga programo estas jam preparata kun pluraj eŭropaj landoj kiuj iĝis partneroj de la evento. Jam eblas aliĝi!




**La 109-a Universala Kongreso de Esperanto alproksimiĝas!** Ĝi okazos en **Aruŝo (Tanzanio), inter la 3-a kaj la 10-a de Aŭgusto 2024**. La Kongresa Fako de UEA kaj la Loka Kongresa Komitato jam multe laboras pri la evento kaj pretigas neforgeseblan sperton por ĉiuj partoprenantoj de la aranĝo.

Trovu pli da eventoj sur la retejo eventaservo.org.

**Por pli da TEJO eventoj, alklaku la bildon!**




---




**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**
**MEMBRIĜU EN TEJO!**

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?** Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

---

# K o l o f o n o

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2023 TEJO*

CC BY SA

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands

INTUIT mailchimp